

**Kelkaj notoj interesaj por ILEI-estraro
el la skajpkunveno de la universitata laborgrupo de ILEI/ESF, 2019/01/16**

1. Nova paĝo de ilei.info pri universitata agado: La strukturo kaj enhavo proponitaj de Radojica taŭgas. Nun indas instali la paĝon kaj plu aktualigadi ĝin.
2. IPR kiel scienca revuo en Esperanto?
En la nuna stato ĝi ŝajnas miksaĵo sen klara fizionomio. Ĉu eldoni apartan sciencajn kalendarojn de IPR? Aŭ pli klare difini kaj apliki ekvilibron de sciencaj kaj movadaj enhavoj, kaj rolon de la Scienca komitato? Viko informis pri rete atingebla kaj senpage uzebla programaro *Open Journal Systems* por kreado kaj mastrumado de sciencaj publikaĵoj. Elisée proponis sin kaj akceptis pristudi la aferon kaj raporti pri la ebloj. Li kaj Viko interkonsentis skajpkunsidi pri tio duope.
3. Studentaj traktaĵoj
Proponi al studentoj de interlingvistiko kaj aliaj fakoj, kie Esperanto uzeblas, la eblecon publikigi en IPR artikolojn el sia studlaboro por magistriĝo / doktoriĝo.
4. Interlingvistiko universitate?
Elisée lanĉis ideon fondi ĉe universitato en Afriko interlingvistikan fakon. Viko proponas pripensi neĉeestajn studojn de interlingvistiko kaj fondi prian laborgrupon por diskuti pri ĉi tiuj ideoj en la ĉi-jara kongreso de ILEI konforme al la kongresa temo *Edukado en virtualaj komunumoj*.
5. Universitataj eventoj en ILEI-kongresoj 2019 kaj 2020

2019 en Serbio, 13-20 julio:

- Preparoj por la konferenco pri *Edukado en virtualaj komunumoj* progresas kunlabore kun la *Fakultato de Teknikaj Sciencoj* en la kongresurbo Ĉaĉak.
- Kiel notite sub 4, aranĝi diskuton pri fondo de universitata studfako de interlingvistiko laŭ la ideoj de Elisée kaj Viko.

2020 verŝajne en Kanado, verŝajne post UK:

- Doni apartan atenton al la universitata agado, al realigado de la konkludoj el la lisbona Nitobe-simpozio kaj al ĝis tiam atingotaj rezultoj de ĉi tiu laborgrupo.
- Ĉu organizi novan *Konferencon de universitatoj kie Esperanto kaj interlingvistiko estas instruataj* enkadre de la ILEI-kongreso 2020?
- En tiu kunteksto adekvata kongresa temo de ILEI en 2020 povas esti: *Interlingvistiko – paradigmoj, defioj kaj atingoj*.

2019/01/16

Notis
Radojica Petrović